



la mondo, ke nia afero ne estas ies persona, sed tutmonda kaj apartenas al ĉiuj "paĉaj batalantoj", kiuj sub la standardo de l' popola frateco kaj komuna bono ne havas la rajton ne porti ankaŭ la nomon de l' honorinda kreinto de nia lingvo internacia — en estontecon kaj eternecon...

Józef Wasniewski.



## Kiel traduki?

S-ro V. Gernet estis prava, kiam li diris ke ĉiu kaj neniu estis prava (vidu N:o 8, 1896).

Traduku kion Vi volas, tio estas justa konsilo...

Ĉiu *bona* traduko estas por ni utila, tio ankaŭ estas vero, sed

1) neniam traduku tradukojn!

2) neniam traduku ion, skribitan fremdlingve, se iu povas (*aŭ* povos) traduki tion saman, kiel skribitan en lia propra lingvo!

3) tradukante ion, penu antaŭ ĉio konservadi *ĉiujn* originalecojn kaj originalaĵojn de la tradukato, ne *senapartigu* ĝin de ĝiaj eksteraj nek internaj apartecoj!

4) tradukinte ion, nepre donu vian tradukon al personoj, kiuj *ne scias* la lingvon de la tradukito, por forigo kaj notigo de ĉiuj diroj nekomprenablaj aŭ neklaraj aŭ dusencaj (kontraŭ volo de aŭtoro kaj tradukinto)! \*).

Nur ĉe tia elektado de materialoj tradukotaj kaj ĉe tia efektiviĝado de tradukado niaj tradukoj povas esti internacie taŭgaj, interesaj kaj gravaj, utilaj.

La traduko de ia traduko estas nur kaŭzo de moko por iu, en kies lingvo estas skribita la originalo.

"Libera" traduko ne estas traduko inda por la lingvo internacia, kiu ebligas la plej precizajn, la plej laŭvortajn tradukojn.

Traduko "vortara", kiu konservas la vortojn kaj kaŝas aŭ forigas la sencon, ankaŭ ne estas traduko. Traduko devas esti *internacia*, sen idiotismoj naciaj, kiuj estas kompreneblaj nur por la samlingvanoj de la aŭtoro.

Tial mi pleje aprobas la tradukon de "Demono", faritan de s-ro Devjatnin, kaj tradukon de "Iliado", se ĝi estas farita el la greka originalo kaj ne el rusa traduko de Gnediĉ \*\*). En la lasta okazo mi bedaŭras pri la perdita laboro (mi ne komparadis la tradukon de s-ro Kofman kun la originalo nek kun la rusa traduko). Pri la traduko de Hamleto mi diros tion saman, kiom ajn ĝi estas bona (mi ĝin ne komparadis, sed ĉiu anglo vole-nevole tion faros).

Traduko de s-ro de Wahl ("Princino Mary") montras kiel malutilaj estas tielaj laboroj: princino anstataŭ principino, "mallumaj okuloj" anstataŭ "sopiraj" (!). Mi preferus ke "La neĝan blovadon" traduku iu ruso kaj ne polo (A. Grabowski). Preferinde devas traduki aŭ la aŭtoroj mem aŭ iliaj samlingvanoj, samlandanoj, samideanoj, entute iliaj "alimiuloj" (alter ego), kiuj tute bone komprenas la aŭtoron.

Lingvo internacia devas nin liberigi de malbonaj kaj falsaj tradukoj kaj falsaj ofte estas la tradukoj el la lingvoj fremdaj, ne sufiĉe konataj. Ni kiel membroj de nacioj necese ricevas naciajn malbonajn tradukojn el ĉiuj lingvoj,

\*) Vidu la leteron de s-ro Sutkovo en n:o 8, 1896. de "L. I."

\*\*\*) La traduko de "Iliado" de s-ro Kofman estas preskaŭ laŭ-vorta kaj tiel proksima al la originalo, kiel la naciaj *prozaj* tradukoj.

Red.

ĉar por ni ne povas traduki samlingvanoj de la aŭtoro kaj niaj tradukistoj ofte ne scias bone ĉiujn lingvojn, el kiuj oni bezonas traduki, sed por ĉiu esperantisto povas kaj devas fari *internacian* tradukon iu *esperantisto el samlingvanoj de la aŭtoro*.

Pli bone ni prokrastu ian tradukon ol faru tradukojn kondamnotajn ĉe la unua oportuna ŝanĝo de cirkonstancoj.

Por eviti tradukojn tro laŭvortajn ni bezonas elekti komitaton de prezentantoj de ĉiuj lingvoj, kun kiuj ni havas ian rilaton. La devo de la membroj de la komitato estos tralegi ĉiujn tradukojn prezentotajn al ili, kaj fari en ili rimarkojn, tuŝantaj nekomprenoblecon aŭ diverskompeneblecon de l' apartaj diroj.

La komitato de redaktoroj-stilistoj devas konsisti el la sekvantaj nacioj: anglo, bohemo, bulgaro, dano, esto, finno, franco, germano, hebreo, hispano, holando, hungaro, italo, latvo, litovo, polo, portugalo, ruso, svedo, dum ni ne havas aferojn kun personoj de aliaj nacioj. La direktoroj devas esti elektitaj aparte per voĉdonado de ĉia nacia grupo de esperantistoj kiel montrintaj la plejan scion de la *propra* lingvo. Ĉiu eĉ la plej malgranda nacio bezonas havi apartan direktoron-stilpurigiston. Tio estas necesa ne sole por la nacio, sed por naciaro, kiu bezonas trovi ĉiun homaran esprimilon. Redaktoro ne bezonas esti bona skribisto *internacia*, ĉar tio estos postulata de tradukinto mem. Komitato ne devas "*pli-bonigi*" stilon, ĝi devas nur internaciigi ĝin, malnaciigi ĝin en limoj *necesa*j por komprenobleco, por ĉiuj nacioj.

Laŭ mia opinio tio estis necesa en la komenco de nia agado kaj nun jam tempo montris tian necesecon. Leteroj de s-roj Kazi-Girej, Gernet, Sutkovoĵ jesigas tion. Mi varme petas ne prokrasti plu la plenumon.

En unua tempo por konvinki verkistojn de ĉiu aparta lingvo ke Esperanto povas esprimi ĉiujn la plej kapricajn nuancojn de stilo (de penso kaj sento), oni ne sole *ne* devas eviti verkojn pure lokajn kaj naciajn, sed kontraŭe. Ekzemple laŭ mia opinio estos pli utile traduki Heine kun lia kaprica stilo ol Goethe, Ŝĉedrin ol Puŝkin, Carlyle ol Mill, Mark Twain ol Cooper k. t. p.

Tia redaktado sendube malrapidos *presan* aperon de novaj tradukoj, sed tia maloportuno estos rekompencita per tio, ke ĉiu traduko estos vera imitindo kaj ellernindo.

Krom tio, ĉiu redaktoro kolektos aron da naciaĵoj, kiujn oni devas eviti en tia aŭ alia lingvo. Tiam restos nur kunigi ĉiujn eviteblajn kaj evitindajn naciaĵojn de ia aparta lingvo, kaj tio faros "*Internacian korektilon*" por la dirita lingvo.

Oni povas decidi tiel ke post plena (de *ĉiuj* redaktoroj) redaktado de l' verko la verko devas reveni al la verkinto kaj li laste devas doni finan kaj decidan formon al ĉiuj disputeblaj dirajoj, pripensinte ĉiajn faritajn rimarkojn. Li havas rajton konsenti aŭ ne kun la proponitaj al li ŝanĝoj, sed se li ne konsentos sen sufiĉaj pravigoj je la proponitaj al li ŝanĝoj, la lasta ĉefa redaktoro (ekzemple aŭtoro de l' lingvo) havas rajton rifuzi preni la eldonon en sian esperantan verkaron. Tiel ĉiu verkinto havos eblon kaj okazon pri pensi kaj prilabori de ĉiuj flankoj lian stilon internacian kaj ĉiujn apartecojn de *propra* nacia lingvo. Li tiel fariĝos poste sperta kondukanto de ĉiuj liaj samnaciaj verkantoj kaj entute skribantoj.

Tio estas ne rapida sed fruktodona laboro.

**N. Evstifejev**  
(Krasnojarsk, Rusujo).

## Novajoj.

### Raporto de la juĝanta komitato pri la literatura konkurso de la jaro 1896.

Por la literatura konkurso, anoncita en la N:o 5 de "Lingvo Internacia" estis senditaj al la juĝanta komitato kvin manuskriptoj:

1. *Kraljević Marko. Tri renkontoj.* Originala rakonto. Devizo: "Dardanus." La enhavo estas sufiĉe interesa, la lingvo preskaŭ senerara kaj la stilo tre bona.

2. *En la brikejo. Ĉifoneto de l' vivo.* Originala rakonto. Devizo: "Ne ludu kun la fajro." La rakonto prezentas tre naturan pentraĵeton el la vivo; kelkaj eraroj de la lingvo kaj la manko de l' ligo inter du partoj de l' verko ŝajne dependas de la rapida verkado. La stilo estas bona.

3. *La venĝo.* Originala rakonto. Devizo: "Libero kaj amo." La enhavo estas malproksima de l' naturo, kaj la lingvo ne estas senriproĉa.

4. *La bukedo.* Komedio en unu akto de I. Potapenko. Tradukis el rusa \*\*\*. La verko estas bone elektita, la traduko estas nezorga.

5. *Niagara* de V. Vitkovski. Tradukis el la lingvo rusa — —. La temo ne estas prospere elektita, la lingvo ne estas senerara.

La juĝanta komitato difinis: bronzan ĵetonon por la verko: "Kraljević Marko" kaj diplomon por la verko: "En la brikejo".

Post la malfermo de l' kovertoj kun la devizoj montriĝis, ke la aŭtoro de la verko: "Kraljević Marko" estas s-ro *M. M. Abesgus*, la aŭtoro de la verko: "En la brikejo" estas s-ro *Józef Wasniewski*.

La aliaj kovertoj ne estis malfermitaj:

Krom la nomitaj verkoj estis ricevita ekster la limtempo de l' konkurso ankoraŭ la verko: "La klasifikacio de sciencoj" kun la devizo: "Solferino". Pri tiu ĉi verko la juĝanta komitato raportas aparte.

Membroj de la juĝanta komitato: *A. Kofman, V. Gernet, S. Šatunovski.*

Odeso, 31-an de januaro 1897.

### Al la societo "Espero" de la juĝanta komitato.

8 tagoj post la limtempo de la literatura konkurso de la jaro 1896 estis de la juĝanta komitato ricevita la verko:

*La klasifikacio de sciencoj.* Artikolo pedagogia. Devizo: "Solferino".

Ĉar la temo, elektita de la aŭtoro, estas tre interesa,

ĉar la verko prezentas la unuan originalan sciencon artikolon en Esperanto, kaj

ĉar la verkoj, alsenditaj por la konkurso ne estas multaj,

la juĝanta komitato difinis akcepti kaj juĝi la nomitan artikolon post la difino pri la artikoloj, alsenditaj ĝustatempe.

Kvankam la juĝanta komitato ne povas tute konsenti la manieron de la aŭtoro de "La klasifikacio de sciencoj" trakti la elektitan temon, ĝi tamen proponas al la societo "Espero" difini al la aŭtoro diplomon.

Membroj de la juĝanta komitato: *A. Kofman, V. Gernet, S. Šatunovski.*

Odeso, 31-an de januaro 1897.

**Pri la Lingvo Internacia parolis:** La N:o 1145 (28 jan. 1897) de l' gazeto *L' Ain-Sefra*, le courier de Mostaganem, franc-araba gazeto eldonata en la urbo Mostaganem de l' provinco Alger en Afriko. La n:o enhavas sufiĉe longan kaj tre favoran artikolon titolitan *Lingvo internacia*, komencantan per la du unuaj versoj de nia himno, en esperanto kaj en franca traduko, kaj finiĝantan per la nomaro de l' ĉefaj agentoj de nia lingvo en diversaj landoj. En la enhavo de l' artikolo, kiun subsignis s-ro A. de V., ni devas traduki la sekvantan:

— "*L' Ain-Sefra* plezurigas donante sciigon pri tiu entrepreno eminente praktika, humana kaj sociala, tiu nova vento de l' inteligenco homa, al niaj afablaj legantinoj kaj legantoj, kiuj sin demandas kien tiras la progreso kaj kiaj estas la bariloj de l' popoloj... Ili sendube konsentos, ke oni bezonas peni meti al la progresoj materialaj la kontraŭpezajon intelektualan por ke fariĝu egalpezo kaj por ke ili povu ĝui ĝiajn fruktojn. — Tio estas la celo de la *Lingvo internacia*. Dank' al tiu ilo por ŝanĝi ideojn, sen la malfacilaĵoj de la ordinaraj lingvoj, la esperantistoj, kvankam el plej diversaj nacioj, povas sin kompreni treege facile, eĉ se ili de l' lingvo patra de l' korespondanto konas nur — lian nomon... Esperanto estas multe inda semo de kompatato kaj frateco inter la popoloj; organo de paceco kaj malbatalo, ĝi faciligas sian mision per la dolĉeco de sia akcento kaj harmonio de siaj sonoj. La ĉarmo de l' voĉo kaj la beleteco de l' rideto ne malgrandiĝas, amindaj legantinoj, se vi uzas la *Lingvo internacia*, kiun vi povas lerni sen peno, kiel speco de intelektuala ripozo, — ĉar tiel nur la melodio de l' itala, de l' hispana, de la greka lingvo, kion ili plej belan havas, eliros de viaj lipoj."

— Varsovia pola ĉiusemajna ĵurnalo: "*Niva*" (Grenkampo) en N:o 47 de 21-a de nov. 1896 presis artikoleon, ke s-ro Jozef Wasniewski lernas svedan lingvon "per originala maniero" — per helpo de la lingvo internacia Esperanto, kiun li scias bone. — La humorista ĵurnalo "*Kolca*" (Pikiloj), eldonata en Varsovio presis la tradukon de l' esperanta versaĵo: "Malpli kaj multpli" el la N:o 4 de "L. Int.", rimarkinte, ke ĝi estas tradukita el la lingvo internacia Esperanto. La tradukon de tiu ĉi versaĵo faris s-ro Jozef Wasniewski.

## El Francujo.

La nova jaro bone komencis por Esperanto en Francujo. La 7-an de Januaro, mi faris *paroladon publikan* en Meaux, urbo de la Pariza ĉirkaŭaĵo. Laŭ tio kio estis al mi raportita de miaj amikoj, la impreso estis bona, kaj ni povas esperi ke tiu ĉi parolado altiros al ni kelkajn novajn amikojn en tiu urbo; la gazeto "le Publicateur" presis tre favoran raporton, kiu estis republikigita de la gazeto de Epernay "le Champenois". — Cetere tiu rekta rezultato ne estas por ni la plej grava. Tiu parolado estas signifa ne per ĝi mem kaj ĝiaj tujaj fruktoj, sed precipe per la novaj kampoj de agado kiujn ĝi malfermas al nia propagando. Por fari paroladojn kun sukceso certa kaj sen elspezoj, la plej bona rimedo estas fari ilin en la Societoj de paroladoj, Societoj filoteĥnikaj, k. a., kiuj ekzistas en multaj urboj. Sed ne estas facile akceptigi en tiaj societoj temon kiel "demando pri lingvo internacia kaj Esperanto", kiu ŝajnas ankoraŭ al multaj homoj seninteresa kaj paradoksa. En tiu afero, kiel en multaj aliaj, la unua paŝo estas la plej malfacila: tiun unuan paŝon mi faris en la Societo filoteĥnika de Meaux, dank' al nia esperantista amiko s-ro G. Butel. Tial mi havas seriozajn kaŭzojn por esperi, ke tiu ĉi parolado ne restos sensekva, sed kontraŭe ke ĝi malfermos al ni aliajn pordojn kaj estos sole la komenco de serio de analogiaj paroladoj farotaj en Parizo kaj en la ĉirkaŭaĵo,

Eble kelkaj amikoj miros ke ni ne pli frue penis en Francujo uzi tiun rimedon de propagando, kiu estas certe unu el la plej bonaj: oni jam faris

al mi tiun rimarkon. Sed vere, ĉu ne estis preferinde kaj prudente atendi por paroli publike pri Esperanto, ĝis kiam nia lingvo estis atinginta sufiĉan firmecon kaj estis kapabla doni per ĝia pasinta vivo garantiojn nedisputeblajn de vivonteco? Nune, post la senfrukta periodo de reforma agitado, nia afero staras firme: malgraŭ la plej malfavoraj cirkonstancoj, nia monata gazeto estis revivigita, malgraŭ la malefeliĉo de nia estro, la Biblioteko trovis en la esperantistaro amikojn por asekuri ĝian vivon; en Francujo precipe, nia afero eksterordinare pliboniĝis kaj enradikiĝis dank' al l' "Etranger", al la "Grand stenographe", k. a. La vivo regula kaj efektiva, kiun atestas la artikoloj de l' "Etranger" kaj la nombro de la esperantistaj membroj de la "Internacia korespondado", estas unu el la plej fortaj argumentoj, kiuj povas fari decidan impreson sur la aŭdantaron de publika parolado. Aliaflanke, ni kalkulas nune en la gazetistaro sufiĉe da amikoj por esti certaj, ke la paroladoj farotaj havos en la suprediritaj gazetoj kaj en aliaj favoran eĥon: kaj per tio ili fariĝas multe pli fruktoportaj. En Francujo ni iris malrapide, sed ni iras certe: tia estas nia sistemo de propagando. Ĉia tago alportas sian progreson.

La komenco de tiu jaro estos signita ankaŭ en nia lando de alia feliĉa novaĵo: *nova eldono de la franca lernolibro (n:o 53)*. La propagando de la lastaj monatoj eluzis la duan eldonon pli rapide ol ni pensis; kaj, dank' al la financa helpo de anonima amiko, s-ro de Beaufront mendis trian eldonon. La manko de tempo malhelpis s-ron de Beaufront pligrandigi la duoblan vortaron, kiel li intencis, (tiu ĉi plibonigo estos por la kvara eldono): li ŝanĝis sole la antaŭparolon, kiu estos en la nova eldono multe pli longa kaj pli detala: ĝi estos tre serioza kaj fundamenta ekzameno de la demando pri lingvo internacia; kaj la propagandemaj amikoj trovos en ĝi ĉiujn ideojn necesajn por defendi venke nian aferon kontraŭ ĉiuj atakoj. La manuskripto estis jam sendita al la presejo Tümmel, kaj la lernolibro estos eldonata espereble en la venonta monato. — Cetere mi atentos ĝian aperon por daŭrigi la serion intencatan de publikaj paroloj: ĉar estus tute senutile konigi Esperanton ne donante la ilon por ellerni ĝin.

René Lemaire.

—❖—  
**Klopodu — batalu!**

Sveda poemo de l' psevdonimo *Parva*.

Se estus l' esper' nur velkanta foli'  
Kiu falos post fin' de somer',  
Se estus faraĵ' via flava pajler'  
Kun spikoj ŝanĝitaj en bran',  
Klopodu antaŭen per volo el ŝtal',  
Batalu je ĉio por veni al cel'!

Se estus la cel' via trompa nur ŝajni'  
Kiu mokas vin kaj kuras for,  
Se estas en mondo nur unu potenc'  
Scianta, ĉu venos plu hor',  
Batalu ankoraŭ — eĉ ĝis la subfal' —  
Plibone ol tempon revadi sen far'!

Trad. P. N—n.

—❖—  
**Bagateloj.**

**Logike.** — Patro, ĉu l' instruisto povas min puni por io, kion mi ne faris?  
— Certe ne, mia filo!  
— Nu, mi ne devas fari mian lecionon.

V. A. Ĥr—i.

## Tagmango de amikoj. \*)

De *Fridiĥ Knapp*, tradukis *J. E. Meier*.

Havano, la ĉefurbo de Vĉstindujo, kuŝas, kiel oni scias, ĉe belega golfo (la plej granda el ĉiuj havenoj maraj de la Nova Mondo) kaj precize ĉe la parto suda; kontraŭ Havano kuŝas la ŝipista urbeto Regla, poste Casa blanca, kaj en distanco de unu mejlo en mezo de la lando kaj kuneligata kun Havano per tramvojo, la akva kaj aerkuraca loko nomata Guanabakvo. Proksimege je tiu-ĉi urbo gracia sin levas la "Altaĵo de la kruĉo" kun neesprimeble bela ĉirkaŭrigardo super maro, bordego, golfo kaj Havano mem. Estis ĉirkaŭ la horo kvara, kiam fininte miajn farindojn en Guanabakvo mi senenergie kaj ŝvitanta kiel ia filtra kruĉo galicia rapidis al la stacidomo por atingi ĝustatempe la vaporŝipon de Havano. Akre turniĝante je strata angulo mi min ektrovis kontraŭ kara malnova amiko, kiun mi jam ne vidis post kelkaj jaroj, kredante ke li estas okupata per ia komerca ofico en Mehiko, Kalifornio aŭ Charlestown. Tiu estis neniu alia ol Juliano de Rohas, kiu estante antaŭ sufiĉe longtempe unu el la "leonoj" de la noblega societo kaj de la "junularo orata", tiam estis adiaŭinta de mi kun ideoj altege flugantaj. Nun mi lin trovas tie ĉe la golfo de Havano, havante vestaĵon kaj ankaŭ vizaĝon degeneritajn, trouzite ĝentilajn.

"Ho, Juliano! Je ĉiuj sanktuloj!"

Li ne permesante min daŭrigi frazon fortege min ĉirkaŭprenis kaj ne lasante mian brakon min kondukis al sia proksima loĝejo tre modesta, kie li igis min sidiĝi kaj fordoni min al lia favoro aŭ malfavoro.

"Tien-ĉi mi vin igis veni kun mi", li diris, "ĉar mi kredas, ke vi ne tagmanĝis ankoraŭ, kaj mi volas havi la ĝojon koregan vidi vin kiel gaston ĉe mi!" — Mi vidis, ke li parolis serioze: vera plezuro eklumis el liaj okuloj beletaj.

"Sed, Juliano..."

"Hodiaŭ ia *sed*, havanta indon, ne ekzistas! Vi bezonas iel tagmanĝi, aŭ en ia restoracio aŭ en la "kafejo mara", aŭ ĉe vi mem... imagu ke vi estas ĉe vi mem kaj ne preparolu pli... Tulo, Tulo!"

"Kiun vi alvokas, Juliano?"

"Mian edzineton, mian virineton, por ke vi du konatiĝu reciproke — Tulo, aŭdu, Tuleto!"

"Jen mi, Juliano!" respondis el kuireja loko agrabla voĉo, kaj tiam lia juna edzino vere beleta sed vestita en ekstreme modesta maniero eniris en salonon. "Bonan vesperon, kavaliro!"\*\*\*) ŝi diris ekrigardinte min duone terurigita kaj rapide iom pliboniganta sian doman vestaĵon senzorge aranĝitan.

"Ĉe viaj piedoj, sinjorino, bonegan vesperon!"

"Forigu vi la komplimentojn, pro Dio!" interrompis Juliano senpacience; "vi salutu vin reciproke kiel plej bonaj amikoj!"

"Tulo amata mia!" li karese sin turnis al sia edzino, "tiu-ĉi benitulo de Sinjoro estas al mi amiko kara, eĉ plej kara; ni nin jam ne vidis dum eterne, mi lin renkontis ĉe strata angulo, mi lin arestis, lin tien-ĉi alkondukis,

\*) El "Altes und Neues aus dem Pegnesischen Blumenorden" II, Nürnberg, Joh. Leonh. Schrag, 1893.

\*\*) "Kavaliro hispanoj uzas ordinare anstataŭ *sinjoro*.

kaj nun li devos tagmanĝi kune kun ni. Vi faru bone viajn devojn kaj memoru, ke estos tagmanĝo de amikoj, "*una comida de confianza*".

Kaj senzorge li min denove ĉirkaŭprenis.

Ekrigardo al la geedzoj rakontis al mi la tutan historion. Li estis ankoraŭ la homo aminda, honesta sed senpense senzorga kiel antaŭe; ŝi estis virineto malriĉa, senkuraĝa, kiu, juĝante laŭ la domo, meblaro, vestaĵo kaj ia netrompebla trajto ĉe ŝiaj lipoj, estis barigita per plej malmulte da rimedoj, kiujn pretendas ia iome bonaranĝita domestraĵo eĉ interne la baroj vere tre larĝaj de kreola gastemeco vilaĝa. Duone frapita de miro ŝi rigardis sian edzon kaj min; mi bedaŭris ŝian sendecidecon infanan, kiun fine ŝi finis per rapidi en la ĉambbron apudan. Post du minutoj ŝi per voĉo iome tremanta vokis sian doman tiranon: "Juliano!"

"Jen mi estas, koro mia!" tiu-ĉi ekkriis kaj tuj eniris post la kurtenon el ŝtofo maldika, bariganta la ĉambbron de la salono.

Jen mi restis sola. Se mi min forigus, mi farus plej sence; sed tion fari mi ne povis sen ofendi lin, koleremulon, plej mortiginte. La tagmanĝo kaŭzos multe da zorgoj al ŝi. Juliano, ŝajne, ne sin trovis en la stato plej bona; videble li estas, kiel li estis antaŭe: hodiaŭ supre, morgaŭ malriĉa kiel rato, sed ĉiam kuraĝa, ĝojega kaj, antaŭ ĉio, senzorga. — La hejmo de Juliano estis malgranda, bedaŭrinde! Ĉar kun sufiĉe granda turmento mi senvole fariĝis auskultanta la sekvantan "dueteton" geedzan.

"Juliano, kion do vi faris al mi!? Kiel do vi kuraĝis alkonduki en la hejmon sinjoron nekonitan, sciante la staton de niaj nunaj ĉirkonstancoj?"

"Sed, filineto, estas amiko intima!"

"Kaj kion mi prezentos al li por tagmanĝi?"

"Ion!"

"Juliano, ho! Kio do estas io? Kvar aŭ kvin realojn, kiujn ni havis por la hodiaŭa tago, ni jam elspezis por nia tagmanĝo kutima kvankam ne sufiĉa: ni ne havas tablokovrilon, nek telertuketojn... nenion! — kion do ni donos al la sinjoro por tagmanĝi? Ĉu eble vi havas ankoraŭ ian monon?"

"Du pezetojn — ne! Tri realojn, jen! tri realojn kaj — ho! — ankoraŭ unu medion!"

"Ho, kion do ni faros? Mi mortos pro honto!"

"Ho, mia anĝeleta, ne vi zorgu; li ne estas sinjoro granda, li estas amiko intima! Vi estu certa pri tio, ke li tute nature ne atendas grandan manĝeblaĵon. Ankaŭ li ne estas tre malsata: ni babilados, kaj tiam... vi ekspertos! Sed mi lin lasis sola, — tio-ĉi estas nepardoneble senrespekta ago!"

"Sed, Juliano!"

"Mi tuj revenos, okulpomo mia, timulino vi!"

En tempo de manoturno Juliano ree estis ĉe mia flanko.

"Vi, malgrandulo!" li ŝerce diris, "vi tagmanĝos iom "mallarĝe", sed bonege, vi spertos; ĉar, aŭdu, Tuleto..."

"Aŭskultu min, karega Juliano!" mi min trovis devigita ekparoli. "Estas jam tre malfrue; mi malfruiĝis, pardonu min! Ne, Juliano, vi *devas* aŭskulti min! Mi havis la ĝojon vidi vin, konatiĝi kun via edzineteto rava: mi alestos ĉe via tagmanĝo alifoje — oni min atendas hejme kaj..."

"Juliano, Juliano!" ekkriis la edzino, kiel ŝajnas, el la plej malproksima ĉambro.

"Vi ne foriros, ne!" Juliano min detenadis; "vi restu tie-ĉi! Aŭ ĉu eble vi ne amas tiun-ĉi lokon?"



“Mi promesas al vi per mano kaj buŝo, ke morgaŭ mi alvenos ĉien, sed tiam... estu do senca, Juliano!”

“Juliano, Juliano!” kvazaŭ petante, instigante kaj imprese vokis la edzino, igata de sia honoro kuireja. Kredeble ŝi volis helpi mian intencon.

“Mi alvenos, alflugos al vi, Tuleto! — Kaj vi, unufoje por ĉiam, vi restos tie-ĉi! Mi vin certigas, ke Tuleto preparos tagmanĝon simplan, — ho! tagmanĝon *mabriĉan*, sed ĝi vin kontentigos!” Kaj li tuj forestas.

“Kion vi volas, filineto?” mi aŭdas lin senpacience demandi.

“Vi lasu lin foriri, lasu!” mi aŭdas paroleti mallaŭte.

“Tio ne povas esti, malgrandulino! Mi invitis lin, tial mi estas devigita!”

“Tiam, je nomo de Dio, vi kuru rapide al la *bodega*\*) alportu ovojn por duono da realo, gadon por unu medio, kaj panon blankan por unu medio; tiam — kvaronon da grasajo, kvaronon da vino Catalana, kaj salon! Kaj...”

“Vi atendu unu momenton! Mia sinjoro estas sola, kaj...”

“Juliano!”

Juliano jam estas en la salono kaj serĉas la gazeton tagan.

“Tuleto!” li ekkriis, “Tuleto! Kie do estas la gazeto taga?”

“Jen ĝi, jen!” eksonas la voĉo de Tuleto el la kuirejo.

Tuj la amiko varmegigita kaj servema prezentis al mi la gazeton.

“Tie! Legu la belegan artikolon pri la malfeliĉo terura, kiun spertis la “Indiana fraŭlino” je “Portorika rifo.”

Dirinte tion li transkuris la straton.

Baldaŭ post tio li preterkuris kiel ombro la fenestron por eniri domon sen esti vidita de mi, sed vane! Per *unu* rigardo mi vidis ĉiajn manĝaĵojn malbone kovritajn, kiujn li preterportas penante ilin kaŝi: la panetojn kaj supraĵon de botelo kaŝitajn en liaj poŝoj, kaj voston de gado nesingardeme eltiritan el la pakoteto papera, kiun li portas sub brako.

Demetinte la pakajojn en la kuirejo, li rapidas en la salonon duone sen-spira kaj varmegigita per rapidkurado.

“Jen, amiketo! Kion do vi opinias pri la artikolo?”

“Juliano!” ekkriis la bedaŭrinda virino, turmentata, per voĉo pli alta.

“Jen! Vi legu ankoraŭ tie... en la alia paĝo... la grafo de Lermos...”

Kaj li min forlasas rapidante.

“Kio estas, koreto?”

“Ni ne havas tablokovrilon, pro Dio! Kion mi faros?”

“Vi prenu puran tolaĵon de lito!”

“Ho, Juliano, kia honto! Kial do vi ne lasas lin foriri?”

“Pst! Infaneto, estu nur trankvila, ne ploru... amiko intima!”

“Juliano! Nek tranĉilon nek forkon! Nur la kulereton de l' infano!”

“Ah! Tiam ni manĝos per la fingroj, kiel manĝis niaj antaŭe vivintaj Kubanoj! Tiel ni havos ankoraŭ pli bonan guston!”

“Pro ĉielo! Vi ne faru do ŝercojn! Mi sentadas timon en koro! Ho! Ne min turmentu! — Jen, Juliano! Vi iru al kuzino Karita por prunti de ŝi po paro da teleroj, tranĉiloj, forkoj, tablokovrilo kaj... Oh, Dio mia, Juliano!”

“Post unu momento mi ree estos ĉe vi!”

Kaj Juliano denove transkuras straton, alvokante al mi, dum li preter-rapidas min: “Mi alportos al vi la ‘Voĉon de la Vereco’ — vi devas legi la artikolon kondukantan de la kuraĝega Don Alvar de Mesa!”

\*) Vendejo de ĉiaj eblaj necesajoj (hisp.)

Kvaronhoron poste — mi dume min sentis kvazaŭ mi sidus super karboj kaj pikiloj — li eniris kun pako sub brako kaj liaj poŝoj estis singarde kovritaj per la disfaltita numero de la "Voĉo de Vereco"; li ekhaltas en la kuirejo, tiam li rapide eniras salonon.

"Jen la 'Voĉo de Vereco', ĝi enhavas bonajn artikolojn!"

Kaj mi disfaldis la gazeton, kiu estis tratruita kvazaŭ per pintoj de forko kaj sorbigita per oleo kaj odorigita per ĉiaj eblaj objektoj.

"Juliano!" denove vokis la domestrino senlaca.

"Mi tuj revenos al vi", ridetante diris la edzo turmentata kaj malaperis.

"Juliano, sur kian tablon ni metos la kovrilon?"

Juliano ŝajne pripensadis daŭre kelkaj minutoj, tiam li tre mallaŭte paroletis la vortojn sekvantajn, kiujn nur mi kaj la edzino povis audi:

"Ni havos tablon, atendu! Vi metos la barelon malplenan el la kortotien en la ĉambbron duan, tiam vi metos super ĝin la tabulon tolaĵan — ĉu ne? Kaj tiam la — tablokovrilon!"

"Kian?"

"Vi do scias, koreto! Vi diris al mi, ke vi ne havas tolon de lito puran, tial mi tian postulis de kuzino Karita, kaj ŝi donis al mi tolon de lito kvankam iome uzitan, sed oni ne ekvidos — ĝi estas en la kuirejo, mi kaŝis en ĝi la telerojn pruntitajn... Nun vi preparu ĉion tre pure kaj precize... Mia bona amiko estas atendanta!"

Kaj el la kuirejo rapidante en la salonon.

"Vi tagmanĝos", li diras al mi, "kiel malriĉulo kun malriĉuloj, sed tio ja ne kaŭzos domaĝon: vi ne forlasos nin malsata!"

"Juliano!" mi fine diris al li serioze. "Mi kore bedaŭrus, se mi, por ke vi havu min kiel gaston, kaŭzus al vi tiajn malagrablajojn..."

"Mi vin petas ke vi silentu rilate tiaj aferoj!"

"Mi al vi klarigos, Juliano! Ĉe viroj kaj amikoj ĉio estas permesita, sed vi an edzinon, kiu ne konas min kaj kiu ne povas havi por mi tiel amikan senton kiel havas vi, malnova kolego, sciu — *sin* tio-ĉi multe malĝojas! Vi estas tro senzorga, Juliano, kaj, ekster tio, senprudenta, mi tion diras al vi, ĉar ni estas amikoj, kaj ĉar vi kaŭzis tiajn zorgojn al via edzinetto!"

"Ho, ne zorgu pri tio! Ni ĝuu la estantecon!"

"Sed vi kaŭzis al vi elspezojn!..."

"Ĉu vi intencas malkontentigi min? Tiel ni vivadas ja ĉiutage!"

Ankoraŭ kvaronhoron — nokto fariĝas en Vestindujo subite kvazaŭ en unu momento, — ni babiladis pri tempoj pasintaj, kaj tra la maldikaj kurtenoj mi vidis Tuleton klopodantan laŭ la ordono de l' patrono senzorgema, kiu ĝojanta, kiel li diris, je la venonta tagmanĝo, frotis siajn manojn: "Iru ni manĝi, amikoj, amikoj, vi venu al tablo, al tablo!" li ekkantetis. Ni eniris en la manĝoĉambbron, kie la domestrino, dum malmulte da kandeloj lumadis, nin akceptis amike per rigardo aminda sed ia aparta, kvazaŭ humila, hontema, kiu diris pli ol ia longa elparolado per vortoj.

Ni komencis tagmanĝi. La tablo, laŭ la ordono de Juliano, estis metita en mezo de la ĉambro — la barelo, la tabulo de tolaĵo, la tolo de lito, nenio mankis. Unu pladeto plenigita je gado preparita kun vinagro kaj oleo, havante pipron en mezo, — ĉe l' flanko maldekstra gado rostita, ankaŭ kun pipro, ĉe l' flanko dekstra gado kuirita; tiam ovaĵo tiel granda kiel telero kaj maldika, tre maldika! Kvin panetoj kaj unu biera botelo duone plenigita je

vino katalana ("Palatinto"). Kvar seĝoj<sup>\*)</sup> cirkaŭ la tablo kaj — multe da malsato!

"Tien-ĉi, amiko korega!" ordonis Juliano, "Tien-ĉi sur la seĝon honoran!"

Kaŭze la malfirmeco de la tablo mi forlasis ian tro vivan signon de modesteco kaj sidigis trankvile.

"Ni komencu per la gado!" daŭrigis Juliano, servante min.

"Kiel ajn vi deziras!" mi diris balbutante, ĉar mi ne povis kompreni, kiel estus eble komenci per ia alia manĝaĵo en okazo, se la ovaĵo ne estus tie!"

"Sinjorino", mi demandis Tuleton, "ĉu vi permesos al mi prezenti ion al vi?"

"Ho, mi dankas, mi ne manĝos nun — pli malfrue!"

Mia koro doloriĝis, kiam mi vidis, ke ĉar la domestro ja taksis la manĝaĵon tro malriĉa, tial ŝi trankvila, amikema sed malĝoja oferis sian parton al la komuna profito.

Fine mi faris kvazaŭ mi farus ion — Juliano babiladis multe pli ol li manĝis kaj trinkis, kaj tiel la memorinda tagmanĝo daŭris ĉirkaŭ duonhoron...

Juliano, kontraŭ la volo de sia onklo riĉa estis edziniginta fraŭlinon malriĉan, tiam spertis multe da malfeliĉo kaj vivis esperanta je tempoj pli feliĉaj — estas ĉiam kaj ĉiam la *malnova historio*; sed tiaj detaloj min doloriĝis per terurigante nuntempaj ecoj.

Poste ni prenis kafon, poste diris adiaŭ — mi ekrapidis al la stacidomo, la muloj iris antaŭen, kaj tiel laŭ la trouzitaj reloj ni tumulte alruladis Reglon — flanke la golfo brilanta per miloj da flamoj, lumoj kaj steloj — poste ni transkuradis per rapida "feluko" la grandegan plataĵon de l' haveno kun lumfajroj kaj gardbarkoj — flanke apud la molo la maro brŭanta lumigita per la helegaj radioj ŝanĝantaj de l' lumturo, poste rapide glitadis antaŭen tra la nigraj ŝipstratetoj de la velŝipoj kaj vaporŝipoj kuŝantaj en serioj al ankroj.

La strato flankigita per arboj de la konstruejo de ŝipoj min ricevis... De tiu tempo mi singarde evitas iajn neatenditajn tagmanĝojn de amikoj, kiel en niaj landoj, tiel ankaŭ — trans la oceano!



## Bibliografio.

**Kain.** Mistero de Byron. Traduko el lingvo angla de A. Kofman. Nürnbergo 1896. Eldono de la Societo "Espero" en Peterburgo. Prezo 1 fr. = 40 kop.

N. Gerbel, eminenta rusa tradukisto de multaj eŭropaj verkistoj kaj de Byron aparte, preparolante la demandon: kial ĉiu poeta verko, tradukita en lingvon fremdan, estas nepre pli malbona, ol ĝia originalo, diras: "Por inda reprodukto de poetaj verkoj de universaj poetoj en lingvojn de aliaj popoloj estas necesaj egale fortaj talentoj. Ĝi estas la vero senduba!" Kaj poste li aldonas: "sed bedaŭrinde, supera talentoj tre malofte ion tradukas, proponante tiun-ĉi sendankan laboron al aliaj, malpli talentaj poetoj; tial oni ne devas miri, se inter proponataj tradukoj oni trovas kelkajn multe malpli indajn, ol iliaj originaloj."

<sup>\*)</sup> Seĝo sengasta pretigita por ia ne atendita gasto venonta, esprimas pli ol io alia la gastemencan de Kubo!

Tiel diris la tradukinto de Byron en 1873, sed kion li dirus nun en 1896, se li legus la misteron "Kain" en traduko de A. Kofman, eminenta tradukinto de "Iliado" kaj "Faŭst"? La pureco de stilo, la sonoreco de verso, la beleco kaj facileco de frazurnoj elirintaj el la plumo de A. Kofman jam longe konataj al nia legantaro donas al ni la rajton laŭ la ekzemplo de senmorta germana poeto Goethe, kiu "konsilis siajn kunlandanojn ellerni la anglan lingvon speciale por havi eblon legi Kain'on en la originalo" rekomendi al ĉiu persono, kiu, pro diversaj cirkonstancoj, ne povas legi Kain'on en originalo — ellerni la Lingvon Internacian speciale por legi ĝin en traduko de s-ro Kofman. Kain estas sendube la plej brilanta verko, — laŭ sia enhavo kaj traduko aparte — ĝis nun aperinta sur la horizonto de juna literaturo de nia adorata L. I. kaj ni devas gratuli la Societon "Espero" kun tiu elekto por ĝia eldono.

Nun ni devas diri kelkajn vortojn pri la nedezirataj difektoj de la traduko kaj eldono:

1) La titolo montras nek la prezon de la libro, nek la lingvon, el kiu la verko estas tradukita.

2) En la postparolo mankas la subskribo, tial la leganto ne scias, ĉu ĝi estas skribita de la tradukinto, aŭ de la eldoninto.

3) Kelkaj familinomoj estas skribitaj bedaŭrinde laŭ la ortografio originala sen aldono de fonetika skribformo ekz.: Goethe (Göte); Moore (Mur); Murray (Murrej); Schelley (Ŝelli).

Laŭ nia plejforta konvinko ĉiu eldonanto kaj ĉiu tradukanto devas ĉiam memori, ke ĉio presita en Lingvo Internacia devas esti legebla kaj facile komprenebla ne sole por instruitaj klasoj de kulturaj popoloj, sed laŭeble ankaŭ por personoj kun plej malvastaj scioj de la alfabeto kaj vortaro internacia.

Sed ni devas tamen diri, ke ĉiuj nomitaj maldeziraĵoj ne povas mallumigi la tutan bonan impreson de la libro, kaj ke la eleganteco de la eldono, faranta honoron al la presejo de Tümmel, nur iom konformas al internaj indoj de la verko.

V. S.

## La felico.

En la aŭgusta numero de nia gazeto de la pasinta jaro troviĝas artikolo nomita "La sano", kiu min igis fari kelkajn rememorigojn.

La enhavo de tiu ĉi artikolo estas la jena: La felico, la celo de nia vivo, nur estas atingebla por la sanulo. Se ni estas plene sanaj, se nia nervaro orde funkcias kaj se nia cerba korko ricevas la decan mezuron da nutraĵo, tiam ni havas ĉiam kuraĝon kaj vivdeziron, tiam la tuta mondo al ni ŝajnas kiel rigardata tra rozkolora vitro, ni tiam estas vere feliciaj. Niaj grandaj herooj estis havintaj tian nervaron maldifektan, kaj sen sia plena sano ili ne povus efektivi siajn heroaĵojn. Sed ĉe la homoj malgajaj kaj malsanaj, kiuj antaŭagas je la naturo kaj mortigas, estante ne sufiĉe kuraĝaj por eltoleri la bataladon de l' vivo, ĉe ili oni devas serĉi la kaŭzon de iliaj suferoj en malsaneco.

Tiun ĉi manieron rigardadi la vivon mi trovas kaj malkontentigeblan kaj malgajan. Estas vere, ke la sano, la riĉeco, la gloro, la bonaj familiaj rilatoj k. t. p. faras la vivon de l' homo agrabla, kaj ke al la sano oni eble

devas esti plej dankema. Sed ĉu ĉio tio ĉi povas fari la homon plene feliĉan? Mi kredas ke ne. Estas ĉiam konata, ke la riĉeco ne sufiĉas por kontentigi la plej internajn dezirojn de l' koro. Kial do tion faras plu la sano, kiu en tiu ĉi rilato diferenciĝas de la riĉeco per la grado de l' bonaĵo kaj ne per la speco? Pri multaj malsanuloj oni rakontas, ke ili kun ĝoja kuraĝo renkontis la plej maldolĉajn suferojn, kaj ke ili eĉ en la mortmomento, kiam la saneco kaj la riĉeco havas malpli ol nenian indon, tamen restis feliĉaj kaj kontentaj.

Sed se oni estus juĝita senespere malfeliĉa, almenaŭ en tiu ĉi vivo, ĉar oni portas malsanon nekuraceblan, kian mizeregan estontecon oni renkontus! Tiam plej bone estus tuj fini ĉion per mortiĝo.

La feliĉo ne estus celo de l' vivo, se ĝi estus atingebla nur por la sanulo, ĉar la celo de l' vivo ne povas esti okazaĵo. Sed la feliĉo vere estas nia celo; tial ne sufiĉas por ni esti nur sanaj por atingi tiun ĉi celon.

El kio do konsistas la feliĉo? Estas feliĉo esti perfekta homo, plenumi sian celon kiel homo. Sed la homo ne sole estas estaĵo havanta cerbon, nervaron, sangcirkulaĵon k. t. p.; al li ankaŭ estas donitaj prudento kaj libera volo. La korpo kaj la animo ne estas du estaĵoj, la unua kun la alia pere kunligitaj, kaj kiuj per la morto estos separatitaj, la korpo por refariĝi polvo kaj la animo por eniri en alian vivon; ili nur estas malsimilaj momentoj de la sama spirita estaĵo, separatitaj per la grado de la elvolvado. Nia korpo, kiel ankaŭ la nin ĉirkaŭanta materiala mondo, kiu al ni prezentigas en formo de ŝajnaĵoj troviĝantaj en la tempo kaj la spaco, nur estas nia difekta komprenmaniero. Se nur oni meĥanike per mezurado volas certigi, ke la anguloj de egalfanka triangulo estas egalaj, oni neniam ricevus klaran ĉiam estantan komprenaĵon. Nur per prudentaj argumentoj oni sin sentas konvinkita, se eĉ nenia egalfanka triangulo troviĝus en la tuta mondo. Kaj ĝi efektive ne ekzistas, ĉar kiel ajn precize oni ĝin desegnas, ĉiam estas pensebla iu pli preciza. Per tio ĉi mi volis provi montri laŭ konata pruvirado, ke la spirita vivo de l' homo havas pli da indo ol la korpa, kaj ke tial tiun ĉi vivon antaŭ ĉio la feliĉo devas kontentigi.

Sed kiel do la homo plenumas sian celon kiel homo? Tiu ĉi celo estas plenumita, se la homo ĉiam faras sian devon. La vero estas, ke en tuta la vivo nenio alia kontentigas la homon, ol la scio havi plenumitan sian devon. Tio, kio al ni ordonas la devplenumadon, estas nia morala respondeco, kiun sendube neniu povas neigi, kaŭze la danĝeregaj sekvoj por nia tuta societo, kiujn alportus tia neigado. Sed se la homo havas moralan respondecon, kiun li devigatas obei, li ankaŭ devas havi la volon sufiĉe liberan. Sed la volo laŭ sia enhavo parte estas sentema, parte prudentema. Sentema estas nomita la volo, kiam ĝi kiel celo nur havas la korpan vivon, kiu aperas en la tempo kaj en la spaco, prudentema ĝi fariĝas, kiam ĝi leviĝas super tiuj ĉi bariloj kaj ricevas prudentan enhavon.

En kio konsistas la devo de l' homo? La devo de l' homo estas riĉigi la animon per tio, kio tuŝas ne sole la tempon kaj la spacon, tial ne estas perebla, sed apartenas al la mondo prudenta kaj spirita, kaj tiel fariĝi eternulo. La eterneco ne estas vivo, kiu komenciĝos post la morto kaj poste daŭros senfine, ĉar komenco, daŭro fino estas komprenaĵoj por la tempo. La eterneco estas ĉiama nun, ni vivas jam nun en la eterneco. Tion, kio eterne daŭras, oni povas esprimi per la vorto *amo*. Por esti plene feliĉaj ni devas ami; estas nia devo ami. "Ami estas samtempe la plej malfacila kaj la plej

facila: ĝi postulas oferojn“, iu diris. Nur tio, kio postulas oferojn kaj penojn por fari estas devo. Al ni ne estas devo ami tiujn, kiuj nin reamas; tiu ĉi ni faras malgraŭ ĉiaj devoj. Sed ni devas ami la homojn, kiuj estas por ni seninteresaj, eĉ niajn malamikojn, ni devas ami niajn aferojn, eĉ la plej malgravajn. Aleksandro Vinet diris: “La vera riĉeco de l' vivo estas fordoniĝemo; ni vivas laŭ kiom ni amas.“

Kial do ekzistas tiom da homoj, kiuj, ŝargitaj per ĉiu bonaĵo de tiu ĉi vivo, tamen profunde estas malfeliĉaj? Ne estas sufiĉa kaŭzo en difekta nervaro k. t. p. Kaŭzo estas, ke ne ili kaj neniu alia povas vere plenumi sian tutan devon; neniu povas per si mem ĝuste ami. Kiam ni agis plejbone laŭ niaj fortoj, kaj kiam ni tamen deviĝas konfesi, ke ĉio, kion ni faris, estas nenio, kompare kun tio, kion ni *devis* fari, tiam nin savas de la malespero nur la religio kaj la persona komunikado kun Dio, kiu mem estas la amo kaj kiu nin rigardas kiel ĉion plenumintajn. Esti vere religiema samtempe estas la plej alta prudenteco kaj la sola ilo, kiu plene feliĉigas la homon.

K. H.

—>:⊗:←—

### La fidela amiko.

(N:o 481 en sveda himna libro. De *J. O. Wallin*.)

L' amiko la amata kie estas?	Ho kia mira, bela harmonio
Matene mi Lin serĉas — sola restas.	En vivo kaj en kreitaĵ', en ĉio!
Vespere mi ne trovas Lin — en ploro	Ne devas esti do la fonto kara
Pereas koro.	Eterne klara?
Jen Lia forto estas ja vidata	Ho fonto viva de feliĉa lando,
En flor' odora, en la spik' fleksata;	Ĉu venos mi al Via freŝa rando?
Miksiĝas en sopir', en spiro mia	— Kondukos min al Via ondo brila
La amo Lia.	La mort' trankvila.
Mi aŭdas Lin, rivero kiam fluas,	Animo mia, preĝu en espero!
Pri Li arbaro kantas, vento bruas;	Li min atendas; vidos mi post tero
Plej dolĉe Li en mia kor' parolas	Amikon. Ripozigos kapo mia
Kaj min konsolas.	Ĉe l' brusto lia.
Disigas tamen min de Li nebulo;	Ĉar tuj al bordoj verdaj sen ventego
La preĝ' atingas Lin, sed ne okulo.	Mi venos, al la land' de feliĉego.
Ho ke mi vidu nur de Li imagon,	Ŝafid' timema ĉe l' paŝtist' mi restos,
De Li vizagon!	Ŝirmata estos.

Otto Zeidlitz.

—>:⊗:←—

### Bagateloj.

**Dangera okupado.** La tajloro (kies fileto falis suben laŭ la ŝtuparo sen difekti sin):

Estas brave, Artur, nun vi baldaŭ povas ĉirkaŭportadi la kalkulojn.

—>:⊗:←—

\*) Ĉefepiskopo en Uppsala, † 1839. Glora sveda verkisto de religiaj himnoj.

## Al "letero de tradukinto de Demono".

(N:o 10—11 de "Lingvo Internacia" 1896.)

En sia letero s-ro Devjatnin petas min sciigi prese ĉiujn esperantistojn, kielan impreson li ricevis de lia propra originala rakonto en versoj — "Nevola Mortiginto", kiam ĝi estis neatendite por li mem presita en la "Biblioteko".

Plenumon de tiu-ĉi peto mi trovas tute superflua, ĉar, nedirante eĉ pri la enhavo de la letero de s-ro Devjatnin, jam unu apero de mia estimata amiko antaŭ tuta esperanta mondo post tiel longa silentado \*) sufiĉe montras tion ĉi. Mi povas nur diri, ke tiam, kiel ankaŭ nun, mi ne estis kaj ne estas tute konsenta kun s-ro Devjatnin tuŝante lian "Nevolan Mortiginton". Ĝi, kompreneble, ne estas io tre talenta, kun grava enhavo kaj larĝa ideo, sed ne estas ankaŭ tiel "malfeliĉa" kaj "hontfaranta", kiel pensas ĝia aŭtoro. Ĝi estas ordinara beleta rakonto, facile skribita kaj facile legata sen ia enuo. Mi eĉ opinias, ke troviĝas ne malmultaj el verkantaj kaj presantaj esperantistoj, kiuj volonte subskribus sub ĝi sian nomon.

S-ro Lojko, kiun mi vizitis kune kun s-ro Devjatnin en Vilno, homo tute sincera kaj pli kompetenta ol mi, ĉar li mem apartenas al verkistaro (nur bedaŭrinde li ankaŭ tro longe jam silentas). — s-ro Lojko aŭskultadis kun bona rideto fajrajn parolojn de l' aŭtoro kontraŭ la propra "nova" frukto de plumo, sed restis konsenta kun mi kaj — kiel nun montriĝas — kun Redakcio de "Lingvo Internacia", ke la juĝo de s-ro Devjatnin estas tro severa.

Ha, malfeliĉa "Nevola mortiginto"! Ja tuta via malfeliĉeco sin kaŝas en tio, ke vi estas presita ne en ĥronologia ordo, ke vi restis kiel estis iom nematura, — via do kreinto paŝis grandan paŝan antaŭen ("Demono, Boris Godunov" k. t. p.) kaj ... ripozis sur laŭroj ... Sed vi povas ankaŭ esti tre feliĉa kaj eĉ benita de l' amantoj de bela literaturo, se via subita apero en la mondon vekigas la gloran maldiligentulon, montras al li grandan danĝeron tiel longe ripozati (eĉ sur laŭroj) kaj igas lin por energia fruktoporta laboro ...

Kiam tio ĉi fariĝos, kiam s-ro Devjatnin plenumos sian promeson, doni al amikoj-esperantistoj efektive novajn fruktojn de sia bela plumo, — tiam ni povos nur danki nian estimatan genian majstron por lia feliĉa ideo eltiri el amaso da forĝitaj manuskriptoj tiun-ĉi feliĉe-malfeliĉan verkon kaj aperigi ĝin al la mondo.

Ĝis tiam do ni ... legadu "Nevolan mortiginton"! ... Kio anstataŭigas al ni ankaŭ "grandan mankon de kritiko", dum tiu ĉi lasta laŭ la decida vorto de nia estimata amiko ne naskiĝas en esperanta mondo (p. 194 de N:o supremontrita) ...

**E. Manjkovskaja.**

Kremenec, 2:an tagon post ricevo de Novembra numero de "L. I."



## Letero al la redakcio.

Sinjoro redaktoro!

Mia promeso liveri 25 abonantojn al "L'Etranger" estante publikita en via ĵurnalo devigas min ankaŭ publike sciigi, ke mi jam plenumis la diritan promeson, kio estas notita en la N:o 1 de "L'Etranger" (Decembro 1896).

Mi petas tial vin enmeti tiun ĉi avizon en proksiman n:on de la "Lingvo".

Kun vera estimio A. Z.



\*) "Sic!" diros s-ro Devjatnin. Jes, amiko, — sic, ĉar la mondo juĝas ne laŭ kaŝita en skribtablo, sed laŭ donita prese al komuna juĝo.

La gazeton **Lingvo Internacia** oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Hispanujo** ĉe A. Serapio *Santiago*, Hospitalillo 9, (Coruna).
- „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Puŝkinskaja, 44, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

## Bankiera Domo HENRIH BLOKK

en *S.-Peterburg* vendas

biletojn kun gajnoj de la 1-a, 2-a kaj 3-a (Dvorjana) pruntoj kun iam-post-iamaj pago. — La antaŭdono estas 20,15 kaj 12 rubl. por unu bileto. — La ĉiumonata pago — 10 aŭ 5 rubl. — La 2-an de januaro estas tiraĵo de la 1-a prunto.

La reprezentanto por Odeso:

### Jakov Lipovic Hersencvit,

la sola reprezentanto por Odeso kaj Suda Rusujo de modaj ĵurnaloj de ĉiuj landoj de l' mondo, abonado kaj ponumera vendado. — Akceptado de asekuroj de l' vivo de la asekura societo "Zabotlivost". — Kafo "Hektor". — Reprezentanto de la firmo de Jozevski en Kiev por la vendado de mueliloj de fratoj Zek en Dresden. — Apartenaĵoj por mueliloj, ŝvisaj kribriiloj k. c. — Akceptado de la reprezentadoj. Oni bezonas agentojn. — Odeso, *Riŝeljevskaja 25/22*. — Telegramoj: *Odessa — Hersencvit*.

### Sinjoro E. Arduin

komercisto en *Bordeaux, 11 rue Turenne*, Francujo, deziras trovi ĉie agentojn por la maklera vendado de liaj ruĝaj aŭ blankaj vinoj kaj ankaŭ de liaj brandoj.

Li plezure sendos sian kostotabelon al la Esperantistoj petontaj lin pri tio ĉi. Li rekomendas al ili la bonan kvaliton de siaj vinoj, garantiataj pri natureco kaj vinbereco. Estos ankaŭ por li plezuro respondi kaj informi tiujn el niaj amikoj, kiuj dezirus proponi al li la makleran vendadon l' de produktoj de ilia industrio aŭ komerco.

### V. GERNET

havas la honoron sciigi siajn korespondantojn, ke li povas legi nur en la lingvoj: Esperanto, franca, germana, angla, rusa, latina kaj tre neperfekte en itala kaj portugala. Sekve li tute ne povas respondi la leterojn, skribitaj en aliaj lingvoj.

La redakcio de la "Lingvo Internacia" petas siajn kunlaborantojn skribi ĉion difinitan por la gazeto legeble kaj sur unu flanko de papero.

### Ni petas reaboni.

Por eviti malordon ĉe la dissendado de la unuaj numeroj de "Lingvo Internacia" en la nuna jaro 1897 ni tre petas tiujn esperantistojn, kiuj deziras ricevadi plu nian gazeton, *aboni ĝin ĵustatempe*, aŭ almenaŭ sciigi la redakcion pri sia deziro esti abonantoj en la venonta jaro. La kondiĉoj de la abono restas la antaŭaj, t. e. 3 kronoj = 3,30 germ. markoj = 4,25 frankoj = 800 rejsoj = 1,50 rubloj por la jara ekzemplero, kaj unu senpaga ekzemplero al ĉiu, kiu alsendos al ni 4 pagajn abonojn.

La abonantojn, kiuj abonas la "Lingvon Internacian" per la poŝto, ni petas sendi al ni siajn adresojn, por ke ni povu ilin presi en la gazeto.